

& Letero al amiko eska:

< Rekante 36 el 71 batoj por strofo, entute 426 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Stanislaw Schulhof (Aŭtunaj floroj, 1912) kun vorto "Reminiscenco pri Krakow". Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Recepto por fari bonajn versaĵojn. Klarigoj (*): '2 Plantacioj estas parko sur la loko de iamaj muroj kaj remparoj, kiuj ĉirkaŭadis en mezepoko la urbon Krakow. ; Łódź, elparolu Ŭudĵ, pola urbo.>

(#Melodio:

/MiMi LaLa SoSo LaLa doTi La So; dodo TiTi dodo rere sofa mi ldo; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; dodo TiTi dodo rere sofa mi ldo;

(#Rekantaĵe: Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do; mi redo TilLa Ti doTi La Mi; Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do o)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Fine mi ĝin trovis, kanton mian belan, ; kanton kiun vane serĉis mi en ko2r'. ; Ĝi infano estas mia efektiva, ; part' de koro mia, varma, juna, viva, ; sur herbej' aŭtuna elkreskinta flo2r'.

(×: **Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi ; kaj en la ve2rsoj mi2n kaŝi ; Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi.**)

'2 Ho, mi ĝin rekonas, mi eĉ horon scias, ; kiu sonis tiam nokte sur horloĝ'; sur benketo sidis ni en Plantacio* ; kaj kun kor' krevanta kajkun emocio ; pri hejm' via ni parolis, via Łódź*.

'3 Homoj preteriris, noktaj geamantoj, ; brako ĉe la brako, koro ĉe la kor'; en iliaj vejnoj ruĝa sango bolis, ; siajn esperetojn ĉiuj preparolis - ; ho, benata estu, vi, meznokta hor'!

'4 Tiam koron mian mi al vi malfermis, ; kiel se vi estus mia amatin', ; kaj dum ni parolis unu kun alia ; nova kant' ekĝermis en interno mia, ; sedsurvoje hejmen mi, ho, - - perdis ĝin.

'5 Tage, nokte, mi ĝin serĉis, tamen vane, ; ĉiuj ĝiaj postesignoj estis for. ; Eble, pensis mi, ĝin vento superŝutis, ; eble ĝin por ĉiam terintern' englutis, ; mi ĝin de tiama ne ekvidis hor'!

'6 Kia stranga vere estas ĝi hazardo, ; ke ĵus vi ĝin trovis ie sur la voj'! ; Kvankam vi alian al ĝi formon donis, ; tamen mi la kanton mian tuj rekonis - ; dankon al vi pro farita al mi ĝoj'!